



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 12

Decembro, 2015

Kara Leganto, senhalte proksimiĝas la plej grava evento de la tutmonda Esperantistaro: la zamenhofa Tago (vidu la informon malsupre). Partoprenantoj, nepre parkerigu vortojn de la E-a himno. Por vi estas prezentata mallongigita taglibro de nia estimate s-no prezidanto – d-ro. L. Kordylewski. Nepre prenu por la festo bonan humoron, esperon por la estonteco, amikojn kaj familianojn.

Ĝis la!

–La Redaktoro



El Taglibro de la Prezidanto de L. Kordylewski

Krom la 100a UKo en Lillo kaj la antaŭkongreso en Parizo, dum mia ĉi-jara eŭropa restado mi partoprenis en mia naskiĝlando Pollando ankaŭ tri aliajn gravajn eventojn, kiuj estis ligitaj al Esperanto.

En la sudmontara fama pola ripozloko Krynica okazis la ĉiujara Eŭropa Forumo, kiu arigis amason da partoprenantoj de Orienta kaj Okcidenta Eŭropo, kaj ankaŭ plurajn delegaciojn de multaj foraj ekstereŭropaj landoj. Krom la novelektita porezidento de Pollando A. Duda venis prezidentoj de Slovenio kaj Makedonio kaj multaj aliaj internaciaj gravuloj. La konferenco nature baraktis kun la lingva problemo. La organizantoj fidis, ke la oficialaj lingvoj estis pola, rusa kaj angla, sed fakte estis uzataj ankaŭ dekoj da aliaj lingvoj. Do, regis samtempa kaj postsekvaj interpretado kaj plurlingva tradukado. En la vitraj budoj multlingvaj tradukistoj senlace kaj senĉese faradis ilian eblon, dum

la partoprenantoj baraktis kun la aŭskultiloj. Krom la evidenta kosto, grava malavantaĝo evidentiĝis, ke la sinsekvaj tradukoj forrabadis tempon, kio speciale ĝenis dum la distraĵoj. La situacio tiel kontrastis konatan de ni (Esperantistoj) etoson de la internaciaj E-kunvenoj, kiuj ja estas tute liberaj de tiuj traduk-teknikaj problemoj. Sed domaĝe, la ne-Esperantistaj “seriozaj fakuloj” tute ne volas konscii, ke post nur kelkaj jaroj de la akcepto de Esperanto kiel oficiala lingvo, ili povus majstri tiun facilan lingvon kaj liberigi de la stultaj baroj de miskomprenado dum la internaciaj konferencoj. La eventon en Krynica partoprenis dudeko da Esperantistoj, poloj, sed ankaŭ franco kaj slovakoj. La kantanta grupo “Junaj Voĉoj” el Nowy Sacz (kiu furoris dum UK en Lillo – red.) prezentis la programon



en Esperanto. En la konferenceto estis videbla Esperanta budo kun multaj plurlingvaj informiloj kaj E-donacoj. Tamen, kiel kutime dum tiaj neEsperantistaj internaciaj eventoj, Esperanto vekis nur marĝenan intereson de la partoprenantoj, kiuj, evidente, estis tro okupataj pri aliaj “pli gravaj” aferoj. Multaj el ili eĉ ne rimarkis la kuneston de Esperantistoj, medioj intervjuis la gravulojn, ne nin.

Malpligranda, pure Esperantista evento okazis poste en Poznano. ARKONES allogis esperantistajn artistojn de multaj lokoj en Pollando kaj orienta Eŭropo. Post la sperto de la lingva ĥaoso de Krynica, mi denove vere ĝuis la facilecon de la internaciaj kontaktoj kun alinaciaj plurlingvanoj per Esperanto. La programo estis interesa kaj varia. Plej plaĉis la prezento de “Ursula” fare de la aŭtoro Roman Dobrzynski kaj Malgosia Komarnicka, kiuj ludis rolojn de juna judo – nepo de Zamenhof en varsovia getto, kaj juna germanino – posta Gratapalia en la bombata Berlino. Post jaroj tiuj du individuoj de la malamikaj landoj gesamideaniĝis kaj amikiĝis pere de Esperanto. Pola radio “Varsovia vento” intervjuis min pri miaj ĉi-jaraj impresoj. La redaktoro konfesis, ke li estas konstanta leganto de nia bulteno “Saluton!”.

La tria evento okazis en mia naskiĝurbo Krakovo. La universitata biblioteko Jagiellonka organizis ekspozicion pri Esperanto surbaze de siaj kolektoj de E-libroj. La titolo de la ekspozicio estis “Esperanto – lingvo sen limoj”. La biblioteko estas unu el la plej grandaj kaj gravaj en Pollando. La lokaj esperantistoj liveris multajn aliajn ekspoziciajn. Estis eĉ botelo da Esperanto biero el Lille kaj slovakaj ĉokolado de

venontjara UK en Nitro, multaj filatelaĵoj, afiŝoj, signoj, fotoj. La vojaĝantajn tra Pollando grandformatajn informtabulojn pruntedonis samideano Krzyzak. TEJO prezentis la vojaĝantan flagon de IJK. La solenan malfermon akompanis Esperanto prelegoj, prezentadoj kaj eĉ senpaga leciono de Esperanto. Oni petis min malfermi la ekspozicion kaj tosti je la honoro de D-ro Zamenhof dum la solena akcepto. Estis servataj verdkoloraj kuketoj. Tamen, kvankam amaso da studentoj kaj aliaj intelektuloj uzas la bibliotekon ĉiutage, malgraŭ la centra loko de la ekspozicio ĉe la ĉefa enirejo, ironie nemultaj trapasantoj trovis tempon por haltiĝi kaj pristudi tiel trudeme organizitan ekspozicion. La ĝenerala publika ŝajnas esti imuna je la ĝustaj ideoj, ĉar, verŝajne, ili ne konscias, ke temas ne pri iu fantazia propagando de la nerealaĵo, sed ke oni tie prezentas verajn valorojn de la Internacia Lingvo kaj faktojn pri ĝia praktika aplikado.

Antaŭ unu jaro forpasis karmemora samideano Gregoro Dolgin, homo de senlima humoro, kolektanto de aforismoj. Al via atento estas proponata filozofia sentenco, iam sendita al la redakcio.

Tri Pensigaj Historietoj

1. Iam vilaĝanoj decidis preĝi pro ekpluvo. Dum la tago de la planita preĝo homoj kolektiĝis, sed nur unu knabo kunportis ombrelon. Ĝi estas Kredo.
2. Kiam vi suprenĵetas unujaran knabon, li ridetas, ĉar scias, ke li estos kaptata. Ĝi estas Fido.
3. Ĉiuvespere, dum enlitiĝo, ni ne havas garantian pri la vekigo, sed ni streĉas la vekhorloĝon. Ĝi estas Espero.

Zamenhofa Tago

Zamenhofa Tago' 2015 okazos la 13an de Decembro (dimanĉo) en 42-etaĝa Randolph Tower laŭ la adreso: 188 W. Randolph Street, Chicago, IL 60601. Apudas haltejoj de: Clark/Lake (Blua linio) kaj Washington/Wells (Bruna linio). La gastema salono-klubejo estos je nia dipono de tagmezo kaj ĝis 4 p.m. La prezo estas kutima: \$20.00/ persone. Invitu viajn amikojn kaj familianojn. Bonvolu anonci pri via veno al vicprezidanto Randio Ream laŭ tel.: 773-262-7738 aŭ rete: rsream@yahoo.com. Dankon pro la vizito! Ne forgesu parkerigi vortojn de nia E-himno. Dankon.



La Espero de D-ro L. Zamenhof

*En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al loko.
Ne al glavo sangon soifanta
ĝi la homan tiras familion:
al la mond' eterne militanta
ĝi promesas sanktan harmonion.*

*Sub la sankta signo de l' espero
kolektiĝas pacaj batalantoj,
kaj rapide kreskas la afero
per laboro de la esperantoj.*

*Forte staras muroj de miljaroj
inter la popoloj dividitaj;
sed dissaltos la obstinaj baroj,
per la sankta amo disbatitaj.*

*Sur neŭtrala lingva fundamento,
komprenante unu la alian,
la popoloj faros en konsento
unu grandan rondon familian.
Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝos,
ĝis la bela sonĝo de l' homaro
por eterna ben' efektiviĝos.*

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

1350 N. Wells St., Ŝikago. Bonvenon!
Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro: (773) 344-2276

13an de Decembro, 12-4pt – Zamenhofa Tago en Randolfa Turo.
26an de Januaro – Hiram parolos pri la Epikuranismo
23an de Februaro – Hanso enkondukos en la mondon de Luteranismo

